



# Boletín

n° 429 *Januario - Marto 2020*



*Asociación de utilidad pública*

# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
aperanta de 1949  
Numero 429

Redakto-skipto  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

\* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: [financoj@esperanto.es](mailto:financoj@esperanto.es)

Aliaj aferoj (escepte de financaj):  
[admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

[admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es)

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926  
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon  
en la aŭtomata respondilo)

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio

**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López

**Sekretario:** Águeda Biurrun

**Kasisto:** Jesús M. García Iturrioz

**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor

“ Alberto Granados

**Prezidanto HEJS:** William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

# SALUTVORTOJ

Karaj geamikoj:

Tiu ĉi bulteno kaj tiu ĉi mesaĝo alvenas al viaj hejmoj en tre specialaj kaj neatenditaj kondiĉoj. La nuna situacio, kaŭzita de la epidemio pro kronviruso Covid-19 devigis nin resti fizike izolitaj unuj disde la aliaj. Mi esperas ke tiu izoliĝo tamen ne estu spirita, kaj ke ni povos komunikiĝi profitante la novajn komunikilojn, ankaŭ per nia lingvo, kaj ke vi ĉiuj povu plu resti en kontakto kun nia komunumo.

Kelkaj el vi legos tiun ĉi mesaĝon per tiaj elektronikaj rimedoj, ĉar ni decidis sendi la bitan version per reposto al ĉiuj anoj kies adresojn ni disponas. La fizikan (paperan) version vi ricevos verŝajne kun iom da prokrasto, ĉar ni decidis ne tro ŝarĝi la poŝtan servon, kaj do atendi ĝis pli konvena dato. Ni pardonpetas pri tio.

Ankaŭ la kronviruso devigis nin prokrasti nian nacian kongreson, antaŭviditan por la komenco de majo en Comillas (Kantabrio). Kiel vi legos aparte, la decido estis translokigi ĝin al oktobro, en la sama loko kaj espereble kun sama aŭ simila programo. Ni havos tempon informi pri modifoj kaj aliaj planoj. Ni denove pardonpetas pro la ĝenoj okazigitaj, sed ni esperas ke vi komprenos la decidon, kaj eble eĉ havos pli da tempo por plani, kaze ke la antaŭaj datoj ne estis konvenaj por vi.

Daŭrigas sur paĝo 2

# ENHAVO

1. Salutvortoj.
3. Asambleo Generala Ordinaria / Ordinara Ĝenerala Kunveno
4. La 79-a Hispana Kongreso de Esperanto estas prokrastita ĝis oktobro
5. HEF Spezokonto 2019
6. HEF Buĝeto 2020
7. Raporto pri Aktivaĵoj 2019
12. Informo pri la anaro 2019
13. Evoluo pri la anaro de HEF
14. Kunveno de la prezidanto de HEF en Comillas / Alvoko por nova estraro
15. Helpoj por la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto
16. Nova patronaro de “Fundación Esperanto”
17. Pri grupoj kaj Asocioj
21. Kunmemoro de la akcepto de rifuĝintoj / Gregorio Sobrino (Biografio)
23. Eduardo Larrouy 107-jaraĝa
25. Ekzile en Meksiko
28. Eĥoj kaj sekvoj de nia literatura E-Agado

---

(daŭrigo el paĝo 1)

Ni devis ŝanĝi ankaŭ la daton de la ordinara ĝenerala kunveno de la asocio. Trovu la novan kunvokon en tiu ĉi Bulteno. La aferoj tiom rapide ŝanĝiĝas ke eble ni devos trovi aliajn manierojn okazigi ĝin, aŭ eĉ ŝanĝi la detalojn de la kunvoko. Ĉiukaze, ni provos profiti la elektronikajn rimedojn por ebligi la ĉeeston de sufiĉa nombro da anoj.

Eble tiu ĉi fariĝos senvola eksperimento por estonta pli ofta ricevo de Boletín per tiu elektronika rimedo, kaj por ke la asocio pli ofte kontaktu rete aŭ havu virtualajn renkontojn kun siaj anoj. Bv. kontakti kun la sekretario, por konfirmi kaj aktualigi vian retadreson kaj aliajn datumojn kaj preferojn, por ke ni povu pli ofte kontakti vin.

Sed ĉefe, bv zorgi pri via sano kaj tiu de viaj proksimuloj. En tiuj ĉi kondiĉoj, tio estas nun la plej grava.

*José Antonio del Barrio*  
*Prezidanto de HEF*

# ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente de la Federación Española de Esperanto invita a los miembros de la asociación a participar en la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 24 de mayo de 2020, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en la sede social, calle Rodríguez San Pedro, 13, 3º, de Madrid, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea ordinaria (5 de mayo de 2019).
- 2.- Aprobación de las cuentas y tesorería del 2019.
- 3.- Aprobación de la Memoria de Actividades del 2019.
- 4.- Informe de los socios.
- 5.- Aprobación del Presupuesto para 2020.
- 6.- Cuotas para el año 2021.
- 7.- Renovación de la Junta Directiva.
- 8.- Proyectos para 2020-2021.
- 9.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico, [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 20 de mayo.

Ante la incertidumbre por las restricciones de movimiento por la epidemia, la asociación establecerá medios telemáticos para que los asociados puedan participar desde su domicilio, por medio de la cuenta de Skype de la Federación @esperanto.es, u otras que podrán ser consultadas con la Directiva.

Se prevé la celebración de una Asamblea General Extraordinaria, durante el Congreso Español de Esperanto que en principio tendrá lugar durante el mes de octubre, y que será convocada según el procedimiento establecido.

El Presidente de la Federación  
José Antonio del Barrio Unquera

## ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio alvokas la anojn de la asocio partopreni Ordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 24-an de majo de 2020 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo en dua alvoko), en la oficiala sidejo, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º, de Madrido, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa ordinara kunveno (5a majo 2019).
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2019.
- 3.- Aprobo de la raporto pri aktivajoj de 2019.
- 4.- Informo pri la anaro.
- 5.- Aprobo de la Buĝeto por 2020.
- 6.- Kotizoj por la jaro 2021.
- 7.- Renovigo de la Estraro.
- 8.- Projektoj por 2020-2021.
- 9.- Sugestoj kaj demandoj.

**GRAVAJ RIMARKOJ:** La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de alia membro, sendu mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEF-a retroŝta adreso [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es), aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 20-a de majo.

Pro la necerteco pri eblaj movlimigoj pro la epidemio, la asocio organizos telematikajn rimedojn por ke la anoj povu partopreni je distanco, pere de la konto de Skajpo de la Federacio @esperanto.es, aŭ per aliaj kiujn oni povos interkonsenti kun la Estraro.

Oni antaŭvidas la okazigon de Eksterordinara Ĝenerala Kunveno, dum la Hispana Kongreso de Esperanto kiu antaŭvideble okazos dum la monato oktobro, kaj kiu estos kunvokita laŭ la establita proceduro.

La Prezidanto de HEF  
José Antonio del Barrio Unquera

---

## LA 79a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO ESTAS PROKRASITA ĜIS OKTOBRO

La estraro de Hispana Esperanto-Federacio kaj la Loka Kongresa Komitato de la 79a Hispana Kongreso de Esperanto, antaŭvidita por la 30a de aprilo ĝis 4a de majo en Comillas (Kantabrio), konsiderante la zorgojn rilate al la epidemio de kronviruso Covid-19 kaj la rekomendojn de la ŝtataj kaj internaciaj aŭtoritatoj, volas informi ke la kongreso ne okazos en la menciitaj datoj kaj estas prokrastita.

Post interkonsento kun la loka urbestro, kaj esperante ke la situacio pliboniĝos en la venontaj monatoj, ni decidis ke la kongreso okazos inter la 9a kaj 13a de oktobro 2020, profitante ke la 12a de oktobro estas festa tago en Hispanio.

La tuta kongresa programo estas translokigita al tiuj datoj, kun simila strukturo al tiu jam anoncita. Tamen, ni ne povas konfirmi nun la okazigon de ĉiuj anoncigitaj programeroj, kaj estas antaŭvideble ke iuj estos modifitaj aŭ anstataŭigitaj; pri tio ni informos dum venontaj monatoj. Ni nun pristudas ĉu eblas okazigi la anoncitan postkongresan ekskurson, pri kio ni prenos decido nur post kelkaj semajnoj.

La homoj jam aliĝintaj ricevos rekte informojn pri la proceduro rilate al kotizoj kaj similaj aferoj. Kiel baza decido, ni povas jam informi ke oni redonos la pagitan kotizon al tiuj, kiuj jam certas ke ili ne povos ĉeesti en oktobro.

Hispana Esperanto-Federacio kaj la Loka Kongresa Komitato daŭre informos pri la evoluo de la kongreso per siaj retejoj, sociaj retoj kaj aliaj komunikoj. Ĉiun **demandon** oni plu povas sendi al la adreso de la LKK kongreso@esperanto.es.

HEF bedaŭras la ĝenojn okazigitajn pro la decido kaj esperas vian komprenemon. Ni deziras bonan sanon al ĉiuj niaj amikoj en la tuta mondo, kaj esperas renkonti vin en oktobro en Comillas.

## HEF-SPEZOKONTO 2019

### ENSPEZOJ

	<u>2019</u>	<u>2018</u>	<u>DIFERENCO</u>
HEF-KOTIZOJ	6.472,00	6.185,00	287,00
UNED-KURSO	3.380,00		
SUBVENCIOJ	3.129,75		
LIBRO-SERVO	1.321,09	1.787,98	-466,89
KONGRESO MÁLAGA	300,00		
MEL-UZO SIDEJO	150,00	42,30	107,70
Kongreso Teruel 2017		4.820,00	
IJK-Badajoz		3.605,86	
Madridaj kongresoj		410,42	
Fundación Esperanto			200,00
<b>SUMO ENSPEZOJ:</b>	<b>14.752,84</b>	<b>17.051,56</b>	<b>-2.298,72</b>

### ELSPEZOJ

	<u>2019</u>	<u>2018</u>	<u>DIFERENCO</u>
BOLETÍN	3.063,72	2.833,82	229,90
UNED-KURSO (Instruistoj)	2.535,00		
KOMPUTILAĴOJ	1.064,94	1.130,69	-65,75
MONHELPO PARTOP. IJK	1.000,00		
NAJBARARA KOMUNUMO	796,92	796,92	0,00
TELEFONO	454,51	638,60	-184,09
PROPAGANDO	68,90	190,00	178,90
POŝTO	309,54	417,04	-107,50
BANKMAKLERAJĴOJ	246,10	1.137,55	-891,45
ELEKTRO	229,83	254,72	-24,89
KOTIZOJ UEA	212,04	203,52	8,52
OFICEJAJ MATERIALOJ	161,05	758,63	-597,58
SIDEJA ASEKURO	134,31	130,39	3,92
LIBROĈETOJ	95,50	246,90	-151,40
DIVERSAJ	52,83	93,25	-40,42
KOMPUTILO POR SIDEJO		808,88	
BENKONTIĜO		94,15	
<b>SUMO ELSPEZOJ:</b>	<b>10.725,19</b>	<b>9.735,06</b>	<b>990,13</b>

SALDO 31/12/2018:45.301,70
SALDO 31/12/2019:49.329,35 (+ 4.027,65)

PODETALE (31/12/2019):

BBVA	42.730,38
TRIODOS	2.946,64
UEA-konto	2.518,76
MADRIDA KASO	796,45
PAY PAL	337,12

<b>SUMO</b>	<b>49.329,35</b>
-------------	------------------

**HEF-BUĜETO 2020**

**ENSPEZOJ**

HEF-KOTIZO	6.500,00
UNED-KURSO	3.500,00
LIBRO-SERVO	1.800,00
H. KONGRESO COMILLAS	300,00
MEL-UZO SIDEJO	150,00
ALIAJ	500,00
<b>SUMO</b>	<b>12.750,00</b>

**ELSPEZOJ**

BOLETÍN	3.100,00
UNED-KURSO (Instruistoj)	2.600,00
KOMPUTILAĴOJ	1.100,00
PROPAGANDO	1.000,00
MONHELPO PARTOP. IJK	1.000,00
NAJBARARA KOMUNUMO	800,00
OFICEJAJ MATERIALOJ	500,00
TELEFONO	600,00
LIBROAĈETOJ	500,00
POŝTO	400,00
BANKMAKLERAĴOJ	300,00
KOTIZOJ UEA	250,00
ELEKTRO	250,00
SIDEJA ASEKURO	150,00
ALIAJ	200,00
<b>SUMO</b>	<b>12.750,00</b>

# RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ 2019

## 1. INTERNA ADMINISTRADO

1.1. La estraro kunsidis 6 fojojn.

1.2. Okazis unu ĝenerala kunveno, ordinara en Malago, la 5an de majo de 2019, dum la Hispana Kongreso 2019. Dum ĝi okazis parta renovigo de la estraro, kun ŝanĝo de du voĉdonantoj, unu el kiuj estis la prezidanto de la junulara sekcio HEJS.

1.3. Oni eldonis kvar numerojn de “Boletín” (425, 426, 427 y 428)

1.4. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj interesatoj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni. Ĝi riĉiĝis per novaj eroj.

## 2. ASOCIOJ

2.1. La lokaj kaj regionaj grupoj daŭrigas sian funkciadon, kun propraj aktivaĵoj kaj kursoj.

2.2. Fondaĵo Esperanto celebris sian 50-an datrevenon, kun specialaj helpoj dum la jaro.

## 3. INSTRUADO KAJ TREJNADO

3.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato, precipe organizitajn de la lokaj kluboj.

3.2. La Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) organizis kurson de Esperanto, nivelo A2 dum la jaroj 2018-2019 kaj 2019-2020, kunorganizitan de HEF per interkonsento subskribita oficiale. HEF zorgas pri la selektado de instruistoj kaj kunlaboras en la organizado de la kurso. HEF havigis propran diplomon al sukcesintoj de la kurso kiuj tion petis.

3.3. Dum la 78a Hispana Esperanto-Kongreso, en Malago eblis oficiale ekzameniĝi laŭ la niveloj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

3.4. En aprilo kaj majo, dum 61 tagoj, ekstartiĝis la kurso “Esperanto-Plaĝo”, en Cullera, Valencio, gvidita de la profesoro Dennis Keefe.

3.5. La 27an de septembro, HEF estis invitita partopreni por la dua fojo en agado organizita de la institucio EUNIC, grupiganta la oficialajn eŭropajn lingvoinstitutojn. Temis pri iu “Speak dating”, fulma prezentado de pluraj lingvoj sinsekve. Ĝi okazis en la sidejo de la Goethe-Instituto de Madrido, kaj pri ĝi zorgis Alex Escobedo.



## **4. KONGRESOJ**

### **-Organizitaj de HEF aŭ ties aliĝintaj asocioj**

**4.1.** 78a Hispana Kongreso okazis de la ĝis 5a de majo, en Malago. La temo estis “Lingva situacio en Eŭropo” kaj ĝin partoprenis ĉ. 150 homoj el Hispanio kaj pluraj aliaj landoj.

**4.2.** 71a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio okazis en Malago, en majo.

**4.3.** 21a Andaluza Kongreso, ankaŭ en majo en Malago, parte koincide kun la Hispana Kongreso.

**4.4.** La junulara sekcio de la Federacio, HEJS, organizis duan eldonon de la renkonto nomita “Benkontiĝo” inter la 10a kaj 13a de oktobro en Santandero.

**4.5.** E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato dum la dua semajno de decembro.

### **-Partoprenataj de membroj de HEF**

**4.6.** La 104a Universala Kongreso en Lahtio (Finnlando) en julio de 2019. HEF partoprenis per salutado en la inaŭgura sesio kaj en la Movada Foiro, kie ĝi montris siajn aktivadojn, kaj per aliaj instituciaj agadoj.

**4.7.** La 75a Internacia Junulara Kongreso okazis en Liptovský Hrádok (Slovakio). HEF subvenciis la partoprenon de du anoj de la junulara sekcio HEJS, kiuj aktive partoprenis ties aktivadojn.

**4.8.** Diversaj membroj de HEF partoprenis kaj kunlaboris en la 92a Kongreso de Senacieca Asocio Tutmonda okazinta en Barcelono inter la 4a kaj 11a de aŭgusto. HEF sendis institucian saluton, kiu estis legita dum la Kongreso.

### **-Planataj de HEF**

**4.9.** En la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio kiu okazis en Malago, la estraro informis pri la decido elekti Kantabron, kiel sidejon de la 79a Hispana Esperanto-Kongreso. La elektita urbo estis Comillas, kaj la dato, la ponto de la 1a de majo 2020.

## **5. INSTITUCIA KUNLABORO**

**5.1.** HEF lanĉis kampanjon por pritrakti la lingvan situacion en Eŭropa Unio post la eliro de Britio de tiu institucio. HEF sendis leteron al aŭropaj parlamentanoj pri la afero. Tiu estis ankaŭ kerno de la diskutoj dum la Hispana Esperanto-Kongreso en majo.

**5.3.** La gimnazio Almenara de la urbo Vélez-Málaga (provinco Malago) daŭrigis la projekton nomatan “Esperanto Komuniko” aprobata de la Eŭropa Programo Erasmus Plus.

## **6. ELDONADO**

Dum 2018 HEF ne eldonis propran materialon, sed kontribuis en la disvastigo de libroj rilataj al la hispana kaj iberia kulturoj, inter kiuj:

**6.1.** Estis eldonita kolektiva antologio de iberiaj poetoj, en ĉiuj duoninsulaj lingvoj, inklude de Esperanto, titolita "La suno estas sekreta" ("O Sol é Secreto. Poetas Celebram Eugénio de Andrade"). La libro estis eldonita de la urbestro de Fundão (Portugaliao) kaj en ĝi kunlaboris esperantistaj poetoj.

**6.2.** Estis publikigita en la eldonejo Mondial la traduko al Esperanto de la kolekto de rakontoj de Begoña Paz, "La vundo", unue verkita en la galega lingvo, kun titolo "A ferida". La tradukisto estis Suso Moinhos.

**6.3.** Estis publikigita la traduko al Esperanto el la galega lingvo de “Vento ferido”, de Carlos Casares, kun titolo “Vundita vento”. La tradukisto estis ankaŭ Suso Moinhos, kaj la libro estis prezentita en la Fakultato de Filologio kaj Tradukado de la Universitato de Vigo, kunlabore kun la Fondumo Carlos Casares.

**6.4.** Esperanta Societo de Tenerife ESTO eldonis la tradukon de la grava prelego de la fama kanaria eldonisto S-ro Juan Régulo Pérez (1914-1993), kiun li eldiris en 1984 kiam estis titolita Adopta Filo de la urbo La Laguna, insulo Tenerife.

## **7. DISVASTIGO (PRELEGOJ KAJ PREZENTOJ)**

**7.1.** La 23an de marto oni celebris malferme en Radio Utopía omaĝon al la poeto José Agustín Goytisolo pro la dudeka datreveno de lia morto. Estis deklamitaj pluraj poemoj ne nur de José Agustín Goytisolo sed ankaŭ de la poetoj partoprenintaj, inter kiuj Miguel Fernández, prezentita kiel poeto en Esperanto.

**7.2.** La 21an de marto, en la Fakultato pri Filologio de la Universitato Complutense de Madrido, okazis omaĝo al kataluna poeto Joan Margarit en kiu estis inkludita la legado de poemo tradukita al Esperanto fare de Jorge Camacho.

**7.3.** En la monato aprilo okazis du enkondukaj prelegoj en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Seviljo. La unua, titolita «Esperanto: pli ol internacia linvo. Ni parolu!» gvidita de Vicente Manzano-Arrondo, profesoro de tiu universitato. La dua okazis la vendredon 26an de aprilo, kun escepta invitito, prof. Ilona Koutny, respondeculo de la kursoj pri Esperantologio de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando), kiu prelegis pri «Kiel Esperanto eliris el la provotubo kaj kial ĝi estas bona ilo por la internacia komunikado».

**7.4.** La 26an de aprilo, la tradukisto de Lorca al Esperanto, Miguel Fernández prelegis pri “Lorca, poeto ekstreme universala kaj ekstreme loka”. Ĝi okazis en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, okaze de la “Nokto de la Libroj” organizita de la Madrida Komunumo, kaj pro ties invito al Madrida Esperanto-Liceo.

**7.5.** Tradicia legado de “Don Kihoto” dum la Internacia Tago de la Libro (23a aprilo) en Madrido (Círculo de Bellas Artes): du esperantistoj legis paragrafojn de la esperanta traduko de la verko.

**7.6.** La 21an de majo ĝis la 25an de junio, okazis seminario pri la lingva maljusteco en Afriko, “África en un mundo de idiomas”, organizita de la Universitato de Seviljo, kunordigita de profesoro Vicente Manzano.

**7.7.** La 22an de majo en Kadizo, Vicente Manzano partoprenis kiel preleganto en la agado “Pint of Science”.

**7.8.** La 28an de septembro, okaze de la agadoj por la klimato, esperantista poeto Miguel Fernández partoprenis aranĝon “Poetoj por la klimato” en loka radio.

**7.9.** La 11an de oktobro, profitante la Benkontiĝon organizitan de la junulara sekcio HEJS, oni programis publikan prezentadon de la lingvo al junaj interesitoj, en la librejo La Libre de Santandero.

**7.10.** La 26an de oktobro estis celebrata en la urbo Cheste la dua eldono de la Festivalo de Lingvoj de la mondo organizita de la Esperanto-grupoj de Cheste kaj Valencio. Sub la devizo “Ĉiu kun sia lingvo kaj Esperanto por ĉiuj”, 18 partoprenantoj prezentadis siajn lingvojn dum 45 minutoj ĉiufoje.

**7.11.** En novembro, dum la Modernisma Semajno, en Teruelo, estis memorata la figuro de Julio Belenguer, pioniro de Esperanto en la provinca, kaj lia edzino, kiujn reprezentis Alberto Granado, prezidanto de la grupo Liberanimo kaj Anabel Gimeno, urbkonsilisto de la urbo.

**7.12.** Estis prezentita en kulturcentro Matadero de Madrido la spektaklo “Rompu, rompu!”, kun titolo kaj parta teksto en Esperanto, kreita de artisto Blanca Gracia. HEF kunlaboris en la esperantigo de la teksto kaj la instruo pri la prononcado.

**7.13.** La 15an de decembro oni festis la Internacian Tagon de Esperanto. La lokaj kluboj organizis diversajn aktivadojn kiel prelegojn, kuntagmanĝojn, prezentadon de libroj, ktp.

## **8. EKSPozICIOJ**

**8.1.**-Inter la 7a kaj 15a de februaro okazis la elmonro de ekspozicio pri Esperanto en la Universidad Miguel Hernández de la urbo Elche.

**8.2.** Inter la 18a de februaro kaj 8a de marto eblis viziti la ekspozicion pretigitan de Hispana Esperanto-Federacio en la Lernejo por Plenkreskuloj “F. Giner de los Rios” de Alikanto.

**8.3.** En marto eblis viziti en Teruelo ekspozicio pri Esperanto kaj anarkiismo, en kiu kunlaboris la loka grupo “Liberanimo”.

**8.4.** Esperanto estis la speciala invitito de la jara kunveno kiun la asocio SERVAS, dediĉita al la instigado al la paco per vojaĝo kaj gastigado, celebris je hispania nivelo en la urbo Salamanko, inter la 4a kaj 7a de aprilo. Dum tiuj tagoj eblis viziti ekspozicio pri Esperanto en la sidejo, kaj la prezidanto de HEF prelegis pri la lingvo Esperanto.

**8.5.** Inter la 7a kaj la 28a de junio prezentiĝis ekspozicio pri Esperanto en la Domo de la Kulturo de Mutxamel (urbo en provinco Alikanto, Valencilando).

**8.6.** La 23an de septembro okaze la Eŭropan Tagon de Lingvoj, Hispana Esperanto-Federacio muntis en sia sidejo ekspozicion de libroj tradukitaj al Esperanto, devenantaj el 35 eŭropaj lingvoj.

## **9. RETEJO KAJ SOCIAJ RETOJ**

**9.1.** HEF flegas retpaĝon [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es), kiu estas regule aktualigata. Dum 2019 ĝi ricevis proksimume 1500 vizitojn semajne, kun ĉ. 900 unikaj vizitoj semajne. La domajno [esperanto.es](http://esperanto.es) estas uzata ankaŭ por diversaj lokaj aŭ regionaj asocioj.

**9.2.** Bitoteko: HEF plu flegas la bitan bibliotekon, Bitoteko, kies materialo estas alirebla rete, kaj kiu apartenas al la retoj Hispana kaj Europeana. Dum 2019 oni aldonis pli da materialo.

**9.3.** Daŭris la sendado de la “Bitbulteno”, informilo sendata retpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj unufoje monate. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta), kaj la nunaj ricevantoj estas pli ol 1100.

**9.4.** Sociaj retoj: HEF havas kontojn en *Facebook* (kun 1800 ŝatantoj) kaj *Twitter* (kun 1400 sekvantoj), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivaĵoj pri Esperanto. HEF ankaŭ flegas kanalon en *Youtube*, kiu estas abonata de 1600 homoj kaj kies filmetojn estis spektitaj dum la jaro pli ol 70000 fojojn). La junulara sekcio HEJS havas proprajn kontojn en *Facebook*, *Twitter* kaj *Instagram*. Ankaŭ funkcias diskutkanalo en *Telegram*.

## **10. AMASKOMUNIKILOJ**

**10.1.** La gazetara servo de HEF sendis kvar gazetarajn komunikojn, pri aferoj diversaj: en majo pri la triobla kongreso en Malago, en septembro pri la Eŭropa Tago de la Lingvoj, en oktobro pri la forpaso de Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof kaj en decembro pri la Zamenhofa Tago.

**10.2.** Sekve al tiuj komunikoj aŭ aliaj agadoj, aperis dum 2019 ĉirkaŭ tridek aludoj, notoj aŭ artikoloj pri HEF aŭ pri Esperanto.

Sep el ili estas radiostacioj, unu el kiuj estas tutŝtata. Aliaj sep estas regionaj paperaj ĵurnaloj, aŭ regionaj eldonoj de ŝtataj ĵurnaloj. Pri ĵurnaloj en la reto, Esperanto aperis en kvin okazaĵoj en tiuj ŝtataj kaj aliaj dek en regionaj aŭ lokaj. Fine, ĝi aperis ankaŭ en du apartaj retaj magazenoj: unu el ili universitata kaj faka, la alia dediĉita al hispana lingvo.

Rilate al temoj, dek el la tuto temas pri movadanoj aŭ ilia agado. En sep okazaĵoj, tio publikigita rilatas ĝenerale al la lingvo kaj ĝia interna ideo. Ses temas pri historiaj okazaĵoj kiam Esperanto rolis grave. Aliaj tri, pri kulturaj, beletraj aferoj en la lingvo internacia. Unu plia estas esplorado pri la apero de esperanto ĉe la gazetaro. Kvar montras nur flankajn referencojn al nia lingvo.

## **11. ALIAJ KULTURAJ AKTIVAĴOJ**

**11.1.** Du membroj de HEF, la elstaraj verkistoj kaj tradukistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutierrez Adúriz plu aktivis kiel Prezidanto kaj Sekretario, respektive, de la skipo de gvidantoj de la Belartaj Konkursoj de UEA.

La Sekretario: Águeda Biurrun


---

## **Informo pri la anaro 2019**

-Individuaj membroj (OM, DM, PM kaj HM):	229
-Kolektivaj membroj (KM):	14
-Entute (individuaj+kolektivaj):	243
-Novaj aliĝoj 2019:	33
-Malaliĝoj 2019:	9

# EVOLUO DE LA ANARO DE HEF

Dum la jaro 2019 la estraro de HEF faris ampleksan kampanjon por kreskigi la nombron de aliĝoj al la asocio, kun sufiĉe kontentiga rezulto, kiu kondukis al kresko de la anaro. La rezulto de la klopodoj en la lastaj jaroj estas la relativa stabiligo de la nombro de individuaj anoj de la asocio, post la daŭra falo dum tiu ĉi jarcento. En la grafikaĵo vi povas vidi la evoluon de la anaro en la lastaj 25 jaroj (malhele vidiĝas la individuaj anoj, hele la kolektivaj)



Komence de 2020 la estraro faris analizon de la datumbazo, kaj forigis plurajn anojn kiuj laste ne pagis la du lastajn kotizojn. La rezulto ne aperas do en la Informo pri anaro, kaj videbliĝos nur en la venontjara raporto, kun antaŭvidebla nova falo de la membronombro.

La estraro do faras alvokon al reaktivigo de la membriĝo, kaj al la diskonigo de la laboro de HEF por inviti novajn esperantistojn kunlabori kun la asocio kaj aliĝi al ĝi.

## KUNVENO DE LA PREZIDANTO DE HEF EN COMILLAS



La prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, vojaĝis la 25an de februaro al Comillas (Kantabrio), sidejo de la 79a Hispana Kongreso de Esperanto. Li kunvenis kun la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Carlos Cordero, kaj poste ambaŭ vizitis ties ĉefan sidejon, la kulturcentron El Espolón. Tie ili kunvenis kun la konsilisto pri kulturo de la urbestro de Comillas, Pedro Velarde, por daŭrigi la pretigadon de la renkontiĝo. Oni konstatis la grandan kunlaboron kiun la aŭtoritatoj montras en la organizado de la renkontiĝo.

Kiel oni informas en alia loko, post tiu renkontiĝo, kaj pro la epidemio de kronviruso, oni decidis prokrasti la okazigon de la kongreso. La urbestro montris sian tre grandan kunlaboremon, kaj konfirmis ke la kulturcentro restos je nia dispono en la monato oktobro, en la samaj kondiĉoj. Ni plu informos en venontaj bultenoj pri la modifoj en la programo kaj aliaj detaloj de la organizado de la kongreso.

---

## ALVOKO POR NOVA ESTRARO

HEF rememorigas ke en 2020 finiĝas la deĵorperiodo de sia nuna estraro, kaj do dum la Kunveno okazonta en majo oni devas elekti novan estraron. Iuj nunaj estraranoj jam anoncis sian intencon ne rekandidati por la nova periodo. Kiel ni informis en pasinta Boletín, oni nomumis elektan komisionon, kiu instigas novajn kandidatojn kaj plani la ŝanĝon, sed eblas sin proponi por ĉiu posteno, kaj ankaŭ dum la kumveno mem ni diskutos pri la afero. Do, ni denove petas al la anoj ke ili komencu pripensi pri sia propra kandidatiĝo, kun nova teamo. Partoprenu do la Ĝeneralan Kunvenon, via partopreno estos grava por la estonto de HEF!

### .. KAJ POR NOVA KONGRESURBO

La estraro de HEF devas ne decidis pri la okazigo de la Hispana Kongreso de la jaro 2021. Ni parolis kun diversaj grupoj kaj anoj, sed ankoraŭ restas malfermita la decido pri tio. Ni faras do alvokon al la lokaj grupoj, eĉ neformalaj, kaj al la individuaj anoj, kiuj volas sian urbon al la hispanaj kaj vizitantaj esperantistoj, bv kontakti kun la estraro, por studi la detalojn. Vi nun havas la ŝancon!

# HELPOJ POR LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE ESPERANTO

La situacio kaŭzita de la Covid-19 provokis la nuligon de multaj aliaj esperantistaj eventoj, sed momente oni konservas la kunvokon de la ĉefaj antaŭviditaj por la somero. Konkrete, la junulara internacia asocio TEJO anoncis ke oni daŭrigas la pretigadon de la Internacia Junulara Kongreso, okazonta en Someren (Nederlando) en julio.

Same kiel pasintjare, Hispana Esperanto-Federacio kunvokas helpojn por ke junuloj partoprenu en tiu internacia evento. Ni memorigas la kondiĉojn:

1. Oni subvencios la partoprenon de du junuloj malpli ol 30-jaraj.
2. Al la elektitoj oni pagos la kongresaliĝon kaj la vojaĝelspezojn kun la anoncita limo de 1.000 € entute.
3. Oni publikigos la konkurson pere de la kutimaj komunikiloj uzataj de HEF por informi siajn anojn.
4. En tiu publika konkurso oni pritaksos jenajn meritojn:
  - a) Esti HEJS-ano.
  - b) Havi respondecojn en HEJS, nuntempe aŭ antaŭe.
  - c) Esti jam paganta la kotizon 2020 al HEF/HEJS .
  - ĉ) Esti kunlaboranto en “Boletín” aŭ en aliaj komunikiloj de HEF.
  - d) Aŭtori pri libroj, artikoloj, ... en aŭ pri Esperanto.
5. Post la aljuĝo de la subvencioj, oni pagos la duonon de ĉiu subvencio al ĉiu homo elektita.
6. La homoj subvenciitaj prezentos la atestilojn pri la faritaj elspezoj.
7. La homoj subvenciitaj devos prezenti raporton pri la de ili plenumitaj kongresaj taskoj kiel reprezentantoj de HEJS.
8. Post la ricevo de tiu raporto kaj de la elspezoatestiloj, HEF pagos al subvenciatoj la duan duonon de la subvencio.

La petoj devas alveni al la estraro antaŭ la 15-a de junio, al la adreso: [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es).

TEJO ankaŭ anoncis la rezulton de propra kunvoko por helpi grupon de junuloj en la tuta mondo partopreni la Kongreson; inter ili troviĝos du hispanaj, Ana kaj Elena, el Seviljo.

Oni ankaŭ daŭrigas la pretigadon por la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare disvolviĝos en aŭgusto en Montrealo (Kanado), sed interalie oni modifis la kondiĉojn pri rezervado, por atingi pli grandan flekseblecon. Jam aliĝis pli ol 800 homoj. Vidu pliajn detalojn en: <https://uea.org/kongresoj>.



# NOVA PATRONARO DE "FUNDACIÓN ESPERANTO"



Fine de 2019, okazis renovigo de la patronaro de Fundación Esperanto. La limdato de la antaŭa jam alvenis kaj oni devis starigi novan por alia periodo de 4 jaroj.

Oni devas tuj komenti ke estis komplika situacio ĉar Antonio Marco Botella (prezidanto de Fundación Esperanto) havis sanproblemojn (li estis hospitaliĝinta) kaj sufiĉe aĝa. Oni devas substreki la grandan dediĉon al Esperanto de nia kara veterano dum multaj jaroj

kaj en multaj flankoj: verkisto, movadano, sekretario de *Frateco*, redaktoro de revuoj ("Boletín", "Kajeroj el la Sudo"), organizanto de eventoj... kaj dum la lastaj jaroj kiel Prezidanto de Fundación Esperanto. Ni denove volas danki kaj substreki ties agadojn...

Do, iom urĝe ni devis aranĝi la aferon. Ni tuj faris kontaktojn por solvi la situacion (tiurilate, ni dankas la rapidan helpon de HEF). La nuna patronaro estas la jena:

- Lorenzo Noguero (Prezidanto)
- Enrique Navarro (Vicprezidanto)
- Pablo Conesa (Sekretario)
- Jaime Benito (Patrono)

Menciindas la alveno de nova samideano, nome Pablo Conesa, tre kapabla esperantisto kaj sindonema homo. Mi petis al li la redaktadon de kelkaj linioj kiel prezentado. Jen ili:

*Mi nomiĝas Pablo Conesa kaj nun estas 43-jara. Profesie mi estas instruisto pri la franca en mezlernejo. Mi naskiĝis kaj loĝas en Zaragozo, kie mi esperantiĝis kun 19 jaroj. Mi faris tion dank' al la metodo Parolu Esperanton de José Arroyo, kiu troviĝis en publika biblioteko. Tuj poste mi komencis frekventi Fratecon, kie mi trovis interesajn kaj bonkorajn homojn kun kiuj mi ĝuis parolante esperanton. Mi ne estas aparte aktiva en esperantujo. Tiurilate, miaj lastaj menciindaj aktivaĵoj estas partopreno en la UK de Lisbono de 2018 kaj publikigo de du artikoletoj en Kontakto en 2019.*

Krome, okaze de la aliro al Aragona Registaro por akcepto de la postenoj, oni faris foton kie aperas la membroj de la patronaro.

Mi profitas la okazon por danki la agemon de homoj kiuj en diversaj momentoj kunlaboris en la agado de Fundación Esperanto, kies celo estas la helpo al instruado kaj disvastigo de Esperanto.

Lorenzo Noguero

# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Madrido

### PREZENTADOJ DE ESPERANTO



Dum la monato de februaro, la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, partorpenis en diversaj aktivadoj por diskonigo de Esperanto en Madrido.

La 12an de februaro, li partoprenis en la “Tago de Darwin” (t.e. la celebrado de la naskiĝtago de Charles Darwin, la disvolvinto de la teorio de la evoluo), en agado ĉe

la Nacia Muzeo pri Natur-sciencoj. Konkrete dum sinsekva laŭtlegado de pecoj de verkoj de tiu sciencisto, li legis la unuan paragrafon de “La origino de specioj”, en Esperanto.

La 20an de februaro, José Antonio del Barrio prelegis en la CIEM (Iberia Centro por Studo pri Framasonaro), pri la temo “Esperanto kaj Framasonaro – Esperantistaj Framasonoj”, laŭ la invito de la liberalaj framasonaj loĝioj, en la nova sidejo de tiu organizaĵo.

La 27an de februaro li prelegis ankaŭ en Espacio Olmo (*Spaco Ulmo*), kultura institucio ligita al la politika maldekstro en la strato Olmo, en la madrida kvartalo Lavapiés, pri “Esperanto en la historio de la laborista movado”.

### VIZITO AL LA INSTITUTO TORRES QUEVEDO

La 10an de februaro grupo de madridaj esperantistoj vizitis la ekspozicion pri la inĝeniero, inventisto kaj esperantisto Leonardo Torres Quevedo, montritan en la “Instituto de Tecnologías Físicas y de la Información Leonardo Torres Quevedo” (ITEFI), esplor-centro aparten-anta al CSIC. Ni havis la ŝancon esti gvidataj ankaŭ al alia ekspozicio pri historiaj instrumentoj uzitaj en sciencaj esplorcentroj, kelkaj deven-antaj el antaŭ pli ol jarcento, kaj kiujn oni konservis kaj montras en vitroŝrankoj de la instituto.

## ŜANĜO DE PREZIDANTO EN MEL

En la ordinara ĝenerala kunsido okazinta la pasintan 13an de januaro okazis ŝanĝo de prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo. Kvankam la deĵorperiodo de la nuna estraro ankoraŭ ne finiĝis, la prezidanto montris sian pretecon rezigni por okupiĝi pri aliaj taskoj. Kiel nova prezidanto estis elektita Félix Jiménez Lobo.

En la apudaj fotoj, vi povas vidi simbolan “ŝanĝon de teko” inter la antaŭa kaj nova prezidanto, kaj momento de la komuna laborado, kun ambaŭ prezidantoj kaj la sekretario en la mezo.



---

## LERNEJANOJ EN FRATECO

### ZARAGOZO

La 25an de januaro, en la Zaragoza sidejo de Frateco ni ricevis simpatian viziton de lernejoj (du ĝeinstruistoj kaj dek bonaj ĝelernantoj). Ili unue kontaktis kun ni montrante intereson pri Esperanto. Ili apartenas al Mezlernejo “Santa Ana” de Fraga (Huesca). Tiu grupo partoprenas kun aliaj kvar mezlernejoj (el tri landoj: Pollando, Italio kaj Germanio) en projekto “Erasmus+” nomata “Languaje Families are Related” (la familioj de lingvoj interrilatas). La celo estas koni la lingvajn similaĵojn inter malsamaj lingvoj de Eŭropa Unio.

Kial ili interesiĝis pri Esperanto? La respondo troviĝas en la fakto... ke unu el la mezlernejoj estas de Bjalistoko (“Zespół Szkół Ogólnokształcących i Technicznych”: “Komplekso de Ĝeneralaj kaj Teknikaj Lernejoj”). Ili planas veturi tien por partopreni en renkontiĝo. Ili vizitis nin kun la celo filmi intervjuon, ekkoni nian esperantan societeton kaj fari pretigi laboron. Ili eĉ preparas teatran prezenton pri la aŭtoro de Esperanto.



La gelnantoj faris demandojn pri la internacia lingvo Esperanto kaj pri nia esperantista societo kun la celo ekkoni iomete kion ni faras, dum ili estis filmitaj de la du instruistoj. Ili estis vere tre simpatiaj kaj lertaj geknaboj kaj montris multe da intereso pri nia lingvo. La du instruistoj faris kelkajn etajn videojn kun la demandoj de la gelnantoj kaj la respondoj de la fratecanoj por poste prilabori ilin en filmeto pri la intervjuo.

Antaŭ ol foriri, la prezidanto de Frateco donis al ili du ekzemplerojn de la fama hispana verko "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha", genie elhispanigita de Fernando de Diego, kiu loĝis multege da jaroj en Zaragozo. Ili transdonos tiujn donacojn al samideanoj en Pollando.

Poste ni piediris ĝis la monumento al Esperanto por fari tie kelkajn fotojn.

Do, temis pri tre agrabla vizito de junuloj. Ni esperas, ke nia juna lingvo lasu bonan memoron en ili.

Krome, indas mencii, ke iom poste, la 28an de januaro, alvenis al nia sidejo por fari intervjuon duopo el la ĵurnalo *El Periódico de Aragón*. La raporto aperis publikigita la 29an de januaro. La rezulto estas tre bona kaj pozitiva. La raportisto David Chic faris trafan kaj simpatian prezenton de nia lingvo kaj societo sub la titolo "La lengua de todas" ("La lingvo de ĉiuj").

Lorenzo Noguero

# E-KLUBO EN GRANADO

## GRANADO

Post kelkmonata restado en Granado, pro la Universitato, mi fine decidis krei esperanto-klubon en la urbo kun la celo kunigi ĉiujn geesperantistojn kaj agadi surloke. Por tion fari, la sekretario de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Chema, kreis specialan reĵadadreson ([granada@esperanto.ac](mailto:granada@esperanto.ac)). Mi uzis ĝin por sendi mesaĝojn por inviti al la unua renkontiĝo de la ĵus kreita e-klubo. Aldone, Ĥuandi disponigis al mi la blogon per kiu li informis pri la e-aranĝoj en Granado. Mi dankegas al ambaŭ!

Kiel menciite, mi dissendis mesaĝojn per retpoŝto, sed ankaŭ publikigis informon en kelkaj grupoj de Facebook, en Twitter, Amikumu, WhatsApp kaj Telegramo.

Fine la renkontiĝo okazis la 26-an de januaro. Entute estis kvar esperantistoj. Ni ĉiuj promenis konante unu la alian kaj rakontante nian esperantistiĝon. Poste venis la plej grava parto de la renkontiĝo: diri kion fari estontece. Mi proponis la instruadon de esperanto por altigi la nivelon de la grupo, kiu estis granda plezuro por la ĉeestanto. Do, en la venontaj renkontiĝoj estos kurso por esperantistoj, kiuj havas mezan nivelon en la lingvo. Mi jam planas la starigon de kurso por tiuj, kiuj scias nenion aŭ scias iomete pri Esperanto.

La datoj de la venontaj renkontiĝoj estos publikigitaj en la blogo. Se vi bezonas pli da informo:

Retpoŝto: [granada@esperanto.ac](mailto:granada@esperanto.ac)

Blogo: <http://esperantoengranada.blogspot.com/>

Alejandro Burgos



# KUNMEMORO DE LA AKCEPTO DE RIFUĜINTOJ



En la jaro 2020 oni kunmemoras la centan datrevenon de la kampanjo organizita de la tiamaj hispanaj esperantistoj, precipe en Aragono, Valencia regiono kaj Katalunio, por gastigi aŭstrajn infanojn, kiuj suferadis grandajn malfacilaĵojn post la fino de la Unua Mondmilito. Temis pri meritplena humaneca klopodo, kiu alportis helpon kaj ĝojon al pli ol 300 infanoj, ĉefe el la regiono de Stirio.

Laŭlonge de tiu ĉi jaro, diversaj instancoj, kaj ankaŭ Hispana Esperanto-Federacio, memorigos tiun ĉi notindan kazon de helpo al rifuĝintoj. Kiel ekzemploj de tiu memoro, okazintaj en la komenco de la jaro, Javier Alcalde publikigis en la reta portalo *Ronda Somontano*, artikolon pri Esperanto en Osko (Huesca), kie li menciis tiun iniciaton. Ankaŭ la historiisto Serafin Aldecoa publikigis artikolon pri la afero en la ĵurnalo *Diario de Teruel* (vidu apudan bildon)

Se vi deziras koni pli pri la afero, ni rekomendas la diversajn liborjn kaj artikolojn verkitajn de nia amiko Antonio Marco Botella. En la hispana aperis pasintjare libro pri la akcepto en la valencia regiono, precipe en urbo Chesto, verkita de José Vicente Castillo, kun titolo: "La trajnoj de la espero" ("Los trenes de la esperanza, Esperantistas solidarios: niños y niñas austriacos en la región valenciana").

---

## GREGORIO SOBRINO: Biografio de laborema esperantisto



Gregorio Sobrino naskiĝis la 24an de decembro de 1924 en Arcos de Jalón kaj mortis la 28an de aprilo de 2019. Enrique Navarro, sekretario de FRATECO, iris tien kaj persone kaj nome de la E-societo, esprimi kondolencojn al familiaĵoj.

Li estis la plej aĝa el kvar gefratoj. Kvankam en lia hejmo la mono ne estis tro (eĉ male), dum la jaroj de la Civilmilito (1936-1939) li havis ŝancon ricevi instruadon de majstro kiu iris al lia hejmo.

Kiel anekdoton, li rakontis al mi, ke li iris kun amiko serĉi helikojn por pagi la kajerojn kaj la lecionojn.

Kiam li estis 14jara li lernis la oficon de forĝisto kun sia onklo.

Li studis Mekanikon kaj Elektronikon dum la militservo.

Poste li laboris en Zaragozo kiel mekanikisto de aŭtoj.

Antaŭ ol militservo, li sukcesis eniri en RENFE (Hispanaj naciaj fervojoj). Li eklaboris en la laborejoj pri riparado de lokomotivoj de Soria. Li promociiĝis al posteno de helpisto de lokomotivestro. Li translokiĝis al Madrido.

Li edziĝis en 1953.

Li promociiĝis al lokomotivestro post loĝado de unu jaro en Venta de Baños.

Poste li estis promociita kiel ĉefo de lokomotivestroj kaj li devis translokiĝi al Bilbao. En tiu urbo, li komencis interesiĝi pri idiomoj. Li parolis itale perfekte (ĉar la TAF-traĵnoj estis de FIAT kaj li volis koni perfekte la mekanikon kiu estis nur en la itala). Li scipovis iomete la anglan.

Li loĝis unu jaron en Bilbao. Tie li kontaktis kun Esperanto, kiu akompanis lin la reston de sia vivo. Ĉiam kiam li povis, li legis revuojn kaj librojn en Esperanto. Li estis entuziasmo kaj granda disvastiganto de Esperanto.

Li venis al Zaragozo en 1968 kie li kontaktis kun la grupo *FRATECO* el kiu li restis membro ĝis sia morto.

Kiam li estis 50-jara, li komencis la studojn pri Industria Elektroniko. Li atingis la postenon de subĉefo de prizorgejo de lokomotivoj. Li ankaŭ estis instruisto en la Profesia Lernejo de RENFE. Kiam li estis 62jara, li emeritiĝis kiel ĉefo de prizorgejo de lokomotivoj.

Li amis la fervojojn kaj dediĉis sin al tio dum 42 jaroj.

Li ĉiam estis granda leganto kaj aŭtodidakto en multaj flankoj. Li ankaŭ amis la pentrarton. Li estis aparte lerta pri teknika dezajno. Li faris milojn da desegnaĵoj. Li ankaŭ verkis poeziaĵojn kaj iom da prozaĵoj. Li praktikis la artisman desegnadon kiel tempopasigilo. Li admiris la pentrarton kaj realigis diversajn ekspoziciojn en Soria kaj Zaragozo. Li ankaŭ ŝatis arbojn kaj terkulturadon.

Li partoprenis en diversaj E-kongresoj, kaj naciaj kaj internaciaj. Inter ili, tiu de la 100-jariĝo de Esperanto en Pollando.

Lastatempe, li ankaŭ loĝis en Aŭstrio kun sia filino.

Li estis tre bona amiko de siaj amikoj kaj Esperanto akompanis lin ĉiam kiel plej fidela amiko.

Ripozu pace!

Navarro Enrique

# EDUARDO LARROUY 107-JARAĜA

La pasintan 9-an de marto, nia amiko Eduardo Larrouy iĝis 107-jara.



Li naskiĝis la 9an de marto 1913 en Haro (La Rioja), ene de familio, kiu devenis el franca Vaskujo. Tre juna li jam interesiĝis pri Esperanto, tiel ke en la jaro 1932 (19-jara) aliĝis al kurso gvidata de la elstara esperantisto Alberto Díaz Chapartegui (patro de Amador Díaz, kiu estis prezidanto de Brita E-Asocio).

Laŭ rakontas li mem, la komencoj estis jenaj: ene de amika rondeto, kiu kuniĝis la dimanĉojn por ĉeesti dancejon kaj trinki, laŭ la bilbaoa kutimo, kelkajn glasojn da vino, Eduardo ekparolis pri sia deziro, ke konvenus

la ekzisto de komuna lingvo inter la homoj; tiam, unu el la amikoj respondis ke tiu lingvo jam ekzistis: Esperanto. Tiu sama amiko ankaŭ informis lin pri la ekzisto de E-grupo en Bilbao. Tien iris Eduardo. La ejo estis ege malluksa, kun lampglobeto, kiu pendis el la plafono per simpla fadeno.

Eduardo aliĝis al tiu lernojaro 1932-33 kaj, hazarde, je la fino, estis elektita por legi paĝon de libro (tiama kutimo) kaj ricevis libron subskribita de la instruisto, libro kiu ankoraŭ staras ĉe liaj hejmaj bretoj. La sekvontan lernojaron, li estis jam instruisto kaj en la jaro 1935 eniris la estraron kiel voĉdonanto.





Kaj alvenis la hispana intercivitana milito (1936-1939). Kun ĝi, tre malhelaj jaroj por la E-movado kaj por la tuta hispana popolo. La armeo de Franco eniris Bilbaon en junio 1937; la E-Grupo fermiĝis. Pro timo, la libroj de la biblioteko estis kaŝitaj. Dume, Eduardo partoprenis la militon. Post esti venkitaj en ĝi, Eduardo, kiel aliaj esperantistoj, travivis diversajn malagrablajn spertojn, kiuj sufiĉus por plenigi romanon kaj ankaŭ anekdotojn rilate Esperanton: Li estis kaptita en Santander kaj enkarcerigita en la sportejo de “El Sardinero”; tie li havis la okazon instrui Esperanton al aliaj malliberuloj, konkrete, al 8 el ili.

Post Santander, li estis enkarcerigita en la universitato de Deŭsto (Bilbao) kaj kiam okazis la ribelo en la fortikaĵo “San Cristóbal” (apude de Pamplona) oni veturigis lin al koncentrejo de Miranda de Ebro (Burgos), speciale rezervita por la membroj de la “*internaciaj brigadoj*”; tie, sur koridoro, li aŭskultas paroli Esperanton al du malliberuloj (unu germana, la alia bulgara) kaj alparolas ilin; sed tuj alvenis gardisto, kiu disigis ilin per kriegoj kaj pafilfrapoj; Eduardo ne plu vidis ilin.

De Miranda de Ebro oni veturigis lin al Aranda de Duero (Burgos), Almendralejo, Mérida, Campanario kaj Castuera, kie troviĝis la militfronto. Feliĉe li sukcesis survivi tiujn ege malfacilajn jarojn kaj alveni al nova epoko, en lia vivo kaj en la vivo de la E-Grupo de Bilbao.

Iom post iom la esperanta movado renaskiĝis en Bilbao; je la komenco, ĉar Esperanto ne estis leĝa ene de la diktaturo de Franko, kelkaj esperantistoj komencas kuniĝi por interparoli dum promenis ĉirkaŭ la “Nova Placo” de Bilbao pogrupo de ne pli ol tri personoj; en 1957 la E-Grupo povas denove, laŭleĝe malfermi siajn pordojn; tiel ke Eduardo laboras en Madrido kaj revenas al Bilbao nur kelkajn semajnfinojn, li ne povas ĉiutage partopreni la grupan vivon, sed li ne perdas la kontakton kun la esperantistoj de Bilbao.

Post emeretiĝo, li povas dediĉi pli da tempo al la Grupo; en la jaro 1979 li estis Prezidanto; sed jam de antaŭe apartenis al diversaj estraroj kaj ankaŭ apartenos poste; ege aktiva li partoprenas en la organizado de la 75-a datreveno de la fondiĝo de la Grupo (1981), kio okazigas kongreseton en Bilbao, kun partopreno de esperantistoj el la tuta Hispanio.

Same, lia laboro estis tre grava por la sukceso de la hispana kongreso de la jaro 1989 kaj de la eŭropa (2004), precipe pro liaj demarŝoj ĉe la aŭtoritatoj. Dum postaj jaroj li partoprenos preskaŭ ĉiujn kongresojn universalajn kaj hispanajn.

## **Feliĉan naskiĝtagon, Eduardo!**

# EKZILE EN MEKSIKO

Kiam okazis la faŝista puĉo en Hispanio (1936), malmultaj landoj subtenis praktike la laŭleĝe elektitan respublikan registaron. Inter tiaj esceptoj elstaris la Meksika Respubliko de Lázaro Cárdenas del Río (1895-1970), kiu en 1939-1942 akceptis pli ol 20 000 hispanajn rifuĝintojn. Historiistoj kalkulas, ke almenaŭ 25% el ili estis intelektuloj. “Tiuĉi enmigrintoj ne nur atingis la proponitan liberecon, sed kompanse redonis al la lando nemezureblajn valorojn. Ili interalie ekstimulis la esperantan movadon en sia nova patrio” (Borsboom 1976:170).

Kelkaj el ili fariĝis esperantistoj en Meksiko, kiel Juan de Oyarzábal (1913-1977). Post eliri Hispanion en marto de 1939 per la ŝipo *Almirante Valdés*, Oyarzábal atingis Tunion kaj estis internigita en Meheri Zabbeus (120 km. okcidente de Sfakso), koncentrejo por hispanaj rifuĝintoj. Danke al la diplomataj klopodoj de sia onklino Isabel Oyarzábal Smith, tiutempe hispana ambasadoro en Svedio, post du monatoj li sukcesis forlasi la kampon. Li fine alvenis en Meksikon en junio de 1939, post longa itinero (Marsejlo, Parizo, Londono, Kopenhago, Stokholmo, Amsterdamo, Southampton, Nov-Jorko), kaj ricevinta subtenon de la sveda komitato “Helpo al Hispanio”. En Meksiko li fariĝis konata atomfizikisto. Kaj tie li ankaŭ lernis Esperanton en la kvindekaj jaroj, instruis ĝin en la Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko (UNAM), kaj premiigis poezie en Belartaj Konkursoj de UEA. Li aŭtoris multajn fakajn librojn en la hispana; du el ili havas ankaŭ esperantajn resumojn.

Verŝajne la plej konata hispana esperantisto ekzilita en Meksiko estas la militisto kaj framasono Julio Mangada Rosenörn (1877-1946), naskiĝinta en Kubo. Li ĉefrolis en la publikigo de la Zamenhofa *Homaranismo* en 1916, prezidis Hispanan Esperanto-Asociacion kaj reprezentis la hispanan registaron dum Universalaj Kongresoj. Li ankaŭ kverelis kun tiuj katalunoj (kaj ne nur) kiuj preferis malpli centrisman organizadon de la landa esperantistaro. Komence de la Hispana Milito li sukcese defendis Madridon kiel gvidanto de la tielnomata Kolono Mangada kaj poste laboris ĉe la sidejo de la Internaciaj Brigadoj en Albacete. Finfine li ekziliĝis kun sia familio (edzino kaj filo Luis Mangada Sanz, ankaŭ esperantisto) per la ŝipo *Stanbrook* en marto 1939. En Oran (Alĝerio) li pasigis du monatojn en koncentrejo kune kun kvin mil samlandanoj. En tiaj malfacilaj momentoj, lia prestiĝo kiel esperantisto utilis por ricevi solidaran helpon. Tiel, la franca generalo Louis Bastien, prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo, sukcesis liberigi lin kaj lian familion. Danke al kubaj esperantistoj ili ricevis kubajn pasportojn kaj atingis Casablancan. La argentinaj esperantistoj monsubtenis ilian vojaĝon en la ŝipo *Serpa Pinto* ĝis Meksiko en 1941. Kiam tie li vizitis respondeculon pri la hispanaj ekzilitoj, tiu ekkriis: “Eĉ la ĉinaj esperantistoj zorgas pri vi kaj petas min ke mi helpu vin!” (Mangada 1942).

Unu el la ĉefaj kunlaborantoj de Mangada estis Fernando Redondo Ituarte (1882-1949).

Li estis militisto, armea kartografo, esperantisto, teozofo kaj framasono, kiu en 1933 estis estro de stabo de Francisco Franco, tiutempe Majorka armea komandanto (Margais 2002: 263-366). Fine de la sama jaro li retiriĝis kiel aktiva oficiro. Dum la Hispana Milito, Redondo aliĝis al la respublika armeo kaj batalis en la montaro Guadarrama, ene de la Kolono Mangada. Post la milito Redondo ekziliĝis en Francio kaj de tie li alvenis al Meksiko kun sia familio (edzino, filino kaj nevino) sur la ŝipo *Mexique* la 27-an de julio de 1939. Ili ricevis subtenon de la Teknika Komitato pri Helpo al la Hispanaj Respublikanoj en Meksiko (CTARE) kaj de la Servo de Elmigrado de la Hispanaj Respublikanoj (SERE). Post la venko de la kuba revolucio, la filino Luisa Botella Redondo elmigris al Kubo kaj fariĝis marksisma sociologiistino.

Tamen, ne ĉiuj hispanaj ekzilitoj havis tiun saman bonan sorton. Ekzemple, kvar esperantistaj maristoj retenitaj en la alĝeria koncentrejo de Meheri Zebbeus petis letere al la prezidanto de CTARE akcepton en Meksiko per rekomendo de la meksika esperantisto Jesús Amaya. Ili estis Manuel Rivera Jato, Cándido Luna Pérez, Agustín Corras Plaja kaj Jerónimo Bouza Vila. Kredeble neniu el ili sukcesis atingi Meksikon (Adámez, 2016: 301-302).

Jesús Amaya Topete (1889-1976) estis intelektulo ligata al proleta sindikatismo, kiu motoris la esperantan movadon en Meksiko. Verkinto de pluraj libroj pri meksika historio, li ricevis diversajn premiojn, inter ili la or-medalon de la Meksika Societo pri Geografio kaj Statistiko. Li direktoris la esperantan gazeton *Renovigo* (1934-1947), presita en mil ekzempleroj kiel esperanta fako de *Renobasion*, kultura revuo skribita en ortografie reformita hispana lingvo. En 1931 li fondis la eldonejon Lumen, kaj tie li publikigis Hispan-Amerikan Vortareton (1934), kies hispana parto estas skribita laŭ la reformita ortografio. Li malavare bonvenigis eksterlandajn esperantistojn kiuj vizitis Meksikon kaj tiujn kiuj elektis tiun landon por komenci novan vivon. Elstara ekzemplo tiurilate estas la fondinto de SAT, Eŭgeno Lanti.

Post sia emeritiĝo en 1936, Lanti forlasis Francion, kaj ekvojaĝis per Esperanto tra la mondo. Li vizitis Hispanion kaj Portugalion, restadis en Japanio, Oceanio kaj Sudameriko, kaj alvenis fine al Meksiko. Lanti loĝis plurajn jarojn en la hejmo de Amaya kaj vaste kunlaboris kun *Renovigo*. Amaya ankaŭ helpis lin trovi laboron kiel instruisto de la franca al meksika vidvino. Inter januaro 1941 kaj julio 1942 aperis ok numeroj de *Satana Bulteno*, instigita de Lanti kaj prizorgata de SAT-anoj Myrtle R. Douglas (Morojo) el Los-Anĝeleso (1904-1964) kaj Teofil Duktıl el Mendozo, Argentino (1894/5-1945). Malriĉa, malsana kaj ĉiam pli pesimisma, Lanti mortigis sin en januaro 1947. Sian testamentan leteron li sendis al José Serrano kaj al Francisco Azorín.

Laŭ Borsboom, José Serrano López (1906-1971) estis la plej intima kunulo de Lanti en lia meksika periodo. Juna teozofo, en 1950 li fariĝis la unua prezidanto de Meksika Esperanto-Asocio, antaŭulo de la nuna Meksika Esperanto-Federacio. Lanti kaj Serrano pasigis multe da tempo babilante, kaj kune vizitadis la esperantistan pioniron Ambrosio Vargas, kiu korespondis plurfoje kun Zamenhof. Siaflanke, Francisco Azorín Izquierdo (1885-1975) estis hispana ekzilito, arkitekto (aŭtoro de *Universala Terminologio de la Arkitekturo*, 1932) kaj socialista politikisto, interalie konsulo de la Hispana Respubliko en Tuluzo.

Dum la Tria Kongreso de Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE) en Parizo (1937) li kondamnis la persekuton de la hispana Esperanto-movado. Per la ŝipo *Ipanema* li venis al Meksiko kun la familio kies anoj ĉiuj parolis la internacian lingvon. Tie li kunlaboris kun Lanti, interalie per la ilustrado de *Plena Vortaro de Esperanto*. Lia filo estis la matematikisto kaj esperantisto Francisco Azorín Poch (1914-1989).

Alia hispana ekzilito aktiva en la Esperanto-movado de Meksiko estas Bargas (Borsboom 1976: 170) aŭ Barges (Nájera 2014: 165), sed ni ne havas pliajn detalojn prie. En 1941 alvenis en Meksikon la hispana surrealista pentristino Remedios Varo (1908-1963), filino de la esperantisto, inĝeniero kaj liberpensulo Rodrigo Varo y Zejalvo, kunulino de Benjamin Péret (1899-1959), unu el plej influhavaj surrealistaj poetoj.

Poste, aliaj hispanaj esperantistoj, kiuj ekziliĝis pro la milito daŭre elektis Meksikon kiel sian finan destinon. Tiel, en 1957 alvenis la doktoro, antropologo, esploristo kaj eseisto Antonio Oriol Anguera (1906-1996), eksterordinara intelektulo kiu partoprenis

la militon flanke de la sendependisma kataluna politika partio *Estat Català* [Kataluna Ŝtato], kaj kiu multflanke subtenis la meksikan Esperanto-movadon (Nájera 2014: 22, 167, 180-181). Simile, en 1960 alvenis la verkistino Leonor Tejada Conde-Pelayo. Esperanton ŝi lernis de sia avo, la doktoro Juan José Conde-Pelayo (1847-1922), liberpensulo, matematikisto kaj pacifisto, pioniro de la respublikanismo en Hispanio, kaj konata kiel la doktoro de la malriĉuloj.



Fine, esplorindaj estas


ankaŭ la hispanaj anarkiistaj esperantistoj, kiuj en Meksiko ĉefe aktivis en la liberecanaj rondoj. Gravaj ekzemploj tiurilate estas Hermoso Plaja (1889-1982), eldonisto kaj eksdirektoro de *Solidaridad Obrera*, kaj José de Tapia (1896-1989), instruisto kaj pioniro de la Freinet-pedagogio. La rolo de Esperanto en liberecanaj rondoj evidentiĝas en ĝia uzo en kromnomoj, kiel Marco Floro, nome Joan Perelló i Sintés (pli konata kiel Liberto Callejas), intima amiko de la revoluciuloj Buenaventura Durruti kaj Francisco Ascaso, kaj ankaŭ ekzilito en Meksiko. Jen interesa temo por novaj esploroj.

**Javier Alcalde**

# EĤOJ KAJ SEKVOJ DE NIA LITERATURA E-AGADO

*Miguel Fernández*

En la n-ro 428 de *Boletín*, mi informis pri la aranĝo “Poetoj por la klimato” [Poetas por el clima] en la madrida Radio Utopía [Radio Utopio], kadre de la t.n. Klimat-Semajno (23a-29a de septembro) kontraŭ la mistraktoj farataj al la Tero, kiuj endanĝerigas ĝian pluekziston. Kiel dirite, mi partoprenis tiun aranĝon per lego, en Esperanto kaj en la hispana, de mia poemo *Klimatŝanĝo. Alispeca pluvo / Cambio climático. Otra lluvia*. Nu, en la monato decembro 2019, mi konstatis kun granda plezuro, ke mia hispana versio de ĉi poemo aperis en la n-ro 15 de la andaluza revuo *Eco del Parque* [Eĥo de la Parko] kaj legeblas ankaŭ rete [<https://cabodegata.net/02-cartas-y-opiniones-eco-15/>]. Temas pri la organo de la ekologiisma asocio Amigos del Parque Natural Cabo de Gata-Níjar [Amikoj de la Natura Parko Cabo de Gata-Níjar]. Ĉi asocio batalas ĉefe por konservado de tiu valora spaco en la andaluza provinco Almería, sed solidariĝas kun alilokaj bataloj tiuspecaj kaj denuncas atencojn kontraŭ iu ajn ekosistemo kaj kontraŭ la klimato.



Ankaŭ en decembro 2019, aperis en la konata portugala liberecana periodaĵo *A Batalha* [La Batalo] ese miapluma sub la titolo *Anarquismo e Esperanto na Península Ibérica* [Anarkiismo kaj Esperanto en la Iberia Duoninsulo]. La ese tute okupis du el la centraj paĝoj. La Redakcio de *A Batalha* petis min verki ĝin en la 100-jara jubileo pri la naskiĝo de tiu periodaĵo, kiu iam fariĝis unu el la tri ĵurnaloj pli vendataj en Lisbono.



En la n-ro 425 de *Boletín*, mi raportis pri la efektiviĝo de bela projekto, la apero de la poem-antologio *O sol é secreto* [La suno sekretas], omaĝe al la portugala poeto Eugénio de Andrade (1923-2005), unu el la maĵoraj bar-

doj de la pasint-

jarcenta portugala poezio. Kiel dirite, la antologio konsistis el 106 poemoj de sama nombro da portugaliaj kaj hispanaj poetoj, verkitaj en 8 iberiaj lingvoj plus Esperanto,

iberia kaj universala, kiu laŭ la nombro da kontribuajoj, estis la tria plej uzita en la libro. Al ĝia enhavo estis invititaj kontribui la poetoj de la t.n. Ibera Skolo. Plej volonte Antonio Valén, Gonçalo Neves, Jorge Camacho, Liven Dek, Suso Moinhos kaj mi mem engaĝiĝis en la projekton. La apero de niaj poemoj en ties originala esperanta versio plus en portugalligo fare de Gonçalo Neves, apud lirikaĵoj de nacilingvaj poetoj, pluraj el ili fame konataj, konstituis agnoskon de la E-poezio en internacia kadro, Portugallingvio, kio donas prestiĝon al Esperanto.

En la n-ro 425 de *Boletín*, mi raportis pri la efektiviĝo de bela projekto, la apero de la poem-antologio *O sol é secreto* [La suno sekretas], omaĝe al la portugala poeto Eugénio de Andrade (1923-2005), unu el la maĵoraj bar-

doj de la pasint-

jarcenta portugala poezio. Kiel dirite, la antologio konsistis el 106 poemoj de sama nombro da portugaliaj kaj hispanaj poetoj, verkitaj en 8 iberiaj lingvoj plus Esperanto,

iberia kaj universala, kiu laŭ la nombro da kontribuajoj, estis la tria plej uzita en la libro. Al ĝia enhavo estis invititaj kontribui la poetoj de la t.n. Ibera Skolo. Plej volonte Antonio Valén, Gonçalo Neves, Jorge Camacho, Liven Dek, Suso Moinhos kaj mi mem engaĝiĝis en la projekton. La apero de niaj poemoj en ties originala esperanta versio plus en portugalligo fare de Gonçalo Neves, apud lirikaĵoj de nacilingvaj poetoj, pluraj el ili fame konataj, konstituis agnoskon de la E-poezio en internacia kadro, Portugallingvio, kio donas prestiĝon al Esperanto.



En la n-ro 425 de *Boletín*, mi raportis pri la efektiviĝo de bela projekto, la apero de la poem-antologio *O sol é secreto* [La suno sekretas], omaĝe al la portugala poeto Eugénio de Andrade (1923-2005), unu el la maĵoraj bar-

Nu, meze de oktobro 2019, unu el la organizintoj de tiu poezia evento, la portugala poeto Carlos d'Abreu, kiu ne estas esperantisto, kvankam ja esperantema, kontaktis kelkajn el ni hispanaj E-poetoj por inviti nin partopreni en nova poezia kolektiva projekto. Temis pri omaĝ-libro, poem-antologio, memore al alia el la grandaj portugalaj verkistoj el la 20a jarcento: Fernando Namora (1919-1989), eminenta bardo, romanisto, kuracisto kaj pentristo, aŭtoro de i.a. la poemaro *Mar de Sargaços* [Sargas-mar] kaj la romano *Retalhos da Vida de um Médico* [Fragmentoj de la vivo de kuracisto], kiu siatempe ricevis adaptojn kinan kaj televidan en Portugalio. La poem-antologio, nomata *O sangue dos rios* [La sango de l' riveroj], aperis kiel omaĝo al Namora en la 100-jara jubileo de lia naskiĝo kaj ĝuste 70 jarojn post la publikigo de tiu romano. Tial, legeblas en ĝi 70 poemoj de sama nombro da poetoj en la iberiaj lingvoj portugala, miranda, galega kaj kastilia. Kvankam Esperanto ne estis aligita ĉi-okaze, du E-poetoj, Jorge Camacho kaj mi mem, akceptis la inviton far Carlos d'Abreu kaj kontribuis al la antologio per po unu poemo en la hispana lingvo. La mian mi elektis el mia E-poemaro *Rev-ene*, publikigita de SAT – Eldona Fako Kooperativa en 2018 kaj prezentita en Madrido, Lisbono, Malago kaj Barcelono (en ĉi du lastaj urboj pere de la spektaklo *Mia liriko kaj la muziko*). Temas pri *Certece*, kiun mi hispanigis kiel *Certeza* kaj kiu, en sia originala esperanta formo, tekstas jene:

CERTECO

*(Al Sara Spanò, kiu portas la tutan Mediteraneon en la sango)*

Apenaŭ mi finverkos ĉi karan poemaron,  
min mia beletramo portos sen ajna dubo  
al ia nova mirinda frenezajo,  
al nova proza aŭ versa aventuro,  
kiu min plene kaptos,  
kaj mi batalos plue por la lumo,  
ĉe la literatura barikado,  
pafante per armiloj ŝargitaj per futuro.

La 15an de decembro 2019, nome la lastan Z-tagon aŭ tagon de la E-libro, mi pasigis en Portugalio, ĝuste en Porto, en loko plej konvena kaj laŭa al tiu nia granda festo ĉiujara: la librejo Unicepe. Temas pri veterana studenta libro-kooperativo jam konata en SAT-medioj kaj en la Barcelona SAT-Kongreso, kie pluraj el ĝiaj membroj brile aktivis, jen prezentante interesajn Esperante subtekstigitajn filmojn, jen protokolante kunvenojn... Dank' al la fervora laboro realigata ĉe Unicepe, renaskiĝadas en Portugalio la laborista E-movado! Pro ĉio ĉi, kiam la homo, kiu kun aparta amo flegas tiun centron, Rui Vaz Pinto, invitis min ripeti mian spektaklon *Mia liriko kaj la muziko* en la Unicepe-ejo, kadre de la Z-tago, mi sentis min honorata kaj faris mian eblon por nepre veni tien, kune kun Carmen, mia edzino, portugaldevena laŭ la patrina flanko.

Ĉio mirindis, krom la doloriga fakto, ke la patrino de Rui forpasis ĝuste ĉe nia alveno al Porto, kio tenis nian amikon en plej trista foresto dum niaj kvar tagoj da restado en tiu belega urbo. Sed la vivo pluis kaj, kvankam ni konstante sentis lian mankon kaj bedaŭris lian situacion, la afero disvolviĝis kiel antaŭvidite, rilate al la grandaj kamara-deco kaj amikeco traĝuitaj. La promenoj kaj kunmanĝoj kun niaj geamikoj Xana kaj Roger, kompetentaj kaj entuziasmaj responsuloj pri la E-kursoj ĉe Unicepe, estis aparte ĝuindaj travivaĵoj. La celebrado de la Z-tago komenciĝis per komuna manĝo, tiel abunda kiel delica, en restoracio proksima al la Unicepe-ejo. Ĉeestis Portanoj plus geesperantistoj el aliaj partoj de Portugalio kaj eĉ de Galegio, inter ĉi lastaj Suso Moinhos. La poeto Carlos d'Abreu trajnis multajn kilometrojn nur por konatiĝi kun nia movado kaj kundividi kun ni, amikoj per la poezio kaj per la utopio, neforgeseblajn momentojn. Postmanĝe ni, ĉirkaŭ kvardek homoj, nin turnis al la Unicepe-ejo kaj tie kunsperitis viraajn momentojn de esperantaj kantoj kaj poemoj. Efektive, dum mia prezentado mi ricevis tiel kor-karesajn efluvojn de akceptemo, ke mi senĝene kaj emocie povis elverŝi mian animon muzike kaj lirike. Gratulindas kaj dankindas pro sia bela kunlaborado la Porta velurvoĉa esperantistino Ana Ribeiro, kiu, petite de mi, verve interpretis tri kantojn. Unualoke, ŝi regaligis nin per sia persona versio de *Te recuerdo, Amanda*, de la ĉiliano Víctor Jara, surbaze de mia esperantigo *Kuras vi, Amanda*. Dualoke, ŝi elfervoris en la portugala la renoman kanton *Grândola, Vila Morena*, animon de la portugala t.n. Revolucio de la Diantoj (1974), kiun la ĉeestantaro ĥore kun ŝi kunkantis. Ŝi finis sian prezentadon interpretante esperantan version de bela poemo de la revoluciulo Agostinho Neto (1922-1979), la unua prezidento de Angolo, vera delico por la poezia kaj muzika sento. Mi kaptas ĉi okazon por ankoraŭfoje gratuli kaj danki nian talentan Ana Ribeiro pro ŝia bela kaj valora kontribuo al la prezentado de *Mia liriko kaj la muziko* en Portugalio! Mi esperas, ke Ana kaj mi plue kunlaboros sur la muzika tereno. Kiom da bonaj vibroj!





Ĉe la fino de la spektaklo, mi kolektis en la koro la malavaran kaj sinceran varmon manifestitan de la ĉeestantaro kaj plezure subskribis ne magran kvanton da ekzempleroj de mia poemaro *Rev-ene*.

Sekvatage ni ĝuis la urbon en, fine, suna tago. Ĉiuflanke superba! Posttagmanĝe, ni, kune kun Xana kaj Roger, vizitis la tombejon, kie kuŝas la restaĵoj de mia amata portugala poeto Eugénio de Andrade. Sur lia tomoŝtono, legeblas kortuŝaj versoj el lia poemaro *Até Amanhã* [*Ĝis morgaŭ*], kiuj en mia esperantigo jenas:

La vorto jam naskiĝis:

surlipe ĝi scintilas.

Kareso aŭ aromo,  
ĉe ektuŝo surfingra.

De branĉ' al branĉo flugas,  
enlumen ĝi verŝiĝas.

La morto ne ekzistas:  
ĉio 'stas kant' aŭ flamo.

Ni reflugis Madriden kun la spirito plena de bonaj travivaĵoj, kun la deziro reveni kaj kun la impresoj, ke baldaŭ niaj bravaj Portaj geamikoj estos preparitaj por organizi iun ajn internaciskalan E-kongreson en sia ĉarma urbo. Bele, se tie!

Sanon kaj poezion!



---

<sup>1</sup>Jutube spekteblas kaj tiu prezentado de *Kuras vi, Amanda* fare de Ana Ribero en la sidejo de Unicepe [<https://youtu.be/SMye0CWB3QY>] kaj la prezentado fare de Miguel Fernández kadre de la 92a SAT-Kongreso [<https://youtu.be/K9AiZmzDJME>].

---

## Helpu preventi la disvastigon de spiraj malsanoj kiel COVID-19

Evitu proksiman kontakton kun malsanaj homoj.



Kiam vi tusas aŭ temas, kovru la buŝon per papertuko, kaj tuj forjtu ĝin en rubujon.



Evitu tuŝi la okulojn, nazon kaj buŝon.



Purigu kaj desinfektu objektojn kaj surfacojn, kiujn oni ofte tuŝas.



Ofte lavu la manojn per sapo kaj akvo dum almenaŭ 20 sekundoj.



Restu hejme kiam vi malsanas. Kontaktu kuraciston aŭ sansistemon per telefono.



Se vi havas simptomojn de gripo, uzu maskon por eviti infekton de aliaj homoj.



Evitu homamasojn kaj neurĝajn vojaĝojn.

